



Kulturaj Kajeroj

E. MANÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Simpla : 3 fkoj

Subtena : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri

Kulturaj kajeroj

Épineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

JULIO — AŬGUSTO

1960

4

KULTURAJ KAJEROJ

1960

Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)
Julio Baghy (Hungarujo)
Delfi Dalmau (Hispanujo)
Alberto Barrocas (Urugvajo)
Hannes Koivu (Finnlando)
Robert Martin (Francujo)
Eugeniuzs Matkowski (Pollando)
William Perrenoud (Svislando)
M. de Waard (Nederlando)
kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj.

ENHAVO

..

Bœuf à la Stroganoff — Ferenc Szilágyi.

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Bretonio vin vokas (IV) (R. Martin)
Du grandaj urboj sur la rivero Seine.

El ie en la Mondo :

Kongresoj aŭ Festivaloj ? - Emilja Lapenna.
La aera pend-trajno.
Aŭtune tra Israelo (M. Ginz).

Tra la Esperanta Literaturo :

Kabe (S. Guillot).

Niaj poetoj — E. Matkowski.

Fantaziaĵoj — **La Insulo de l'Okcidento**, John
Masefield (trad. A.J.L. Hughes) (1).

Por via distro.

La Junaj Detektivoj (III) — J.H. Sullivan.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

H. MICARD.

F. Szilágyi skribis por vi :

BOEUF A LA STROGANOFF


Mi volas komenci iom teorie. Temos pri la lingvo. Kio estas lingvo? Ĉiukaze interkompreneblo, socia fenomeno, entute io ne kunnaskita, sed encerbumita iom post iom. Nu, tion vi scias. Esperantistoj uzas Esperanton kaj sekve ankaŭ sian gepatran lingvon iom pli konscie ol la cetera parto de la homaro, kiu bedaŭrinde, estas grave, superas nian nombron.

Ni diras, ke Esperanto estas facila lingvo, ĝin fundamentas logiko, almenaŭ pli granda logiko ol la aliajn lingvojn kaj pri tio ne estas duboj. Sed ni ne troigu la akcenton, kiam ni parolas pri logiko, ĉar homa lingvo ne kapablas esti tute logika, kiel la homo mem prezentas mikroskope malgrandan porcion da logiko en la vivo. Nun estus tre oportune iom aromigi tiun ĉi eldiron per ekzemploj prenita el la vortoj kaj faroj de niaj plej modernaj ŝtataroj kaj el la okazaĵoj de la plej freŝa mondhistorio, sed mi retrudas min al la temo kaj silentas pri tiuj lastaj, kio cetere estas la plej prudenta maniero en tempestaj tempoj de la homa vivo. Ĉar mi ne volas eŝi, mi eĉ ne ilustros la logikajn misaltojn de la lingvo, de ĉiu lingvo, inkl. Esperanton. Mi konstato nur, ke la mallongaj ŝercoj tre ofte ĉerpas el la fakto, ke la lingvo ne estas matematiko, ĝi ne estas filino de la severa logiko. Nu, jen la promesita ŝerco.

Kliento en la administracio de gazeto :
« Bonvolu diri al mi, kiom kostas funebra anonco ? ».

Kontoristino : « 20 centimoj po unu milimetro. »

Kliento : « Estas terure. Mia onklo, kiu ĵus mortis, estis preskaŭ du metrojn alta. »



La rolo de Esperanto? Se oni povas diri rajte, ke Esperanto estas facila lingvo, ĝia rolo tamen ne estas facila. Ĝi devas krei ordon inter tiuj mallogikaĵoj, kiujn la diversaj naciaj lingvoj kreis al siaj uzantoj. Se mi diras laŭ hungara lingvosento, ke mi amas la edzinon de generalo N., ĉar ŝi estas bela kaj bona, svedoj perceptas tiun ĉi senton iom tragedie. Generalo N. do ne devas dueli kun mi pro tiu ĉi frazo, aŭ almenaŭ ne nepre. Se mi diras esperantlingve denove laŭ la hungara lingvosento al sveda sinjorino : « Hodiaŭ vi aspektas bone » mi volas diri, ke ŝi aspektas tre sana hodiaŭ, sed devas esti io en la frazo, kiu diras al ŝi ion alian, ĉar ŝia vizaĝo

sereniĝas, alrigardas vin afable kaj diras, dankon, dankon, vi estas tre afable. Poste oni sciiĝas, ke la responda sveda frazo signifas : « Vi estas tre bela hodiaŭ ! »

Nu tiujn ekzemplojn oni povus daŭrigi ĝis morgaŭ matene. Sed vin interesas, ĉu oni do ne okupu sin pri Esperanto? Male ĝuste por pli facile atingi kaj utiligi la sekretojn de aliaj lingvoj kaj aliaj homgrupoj, oni uzu relative facilan kaj relative pli logikan, malpli anarkian lingvon.

Oni demandas, kio direktas la lingvon. Ĝi ne naskiĝas kun la homo, sed ĝi kreskas kiel ĝi volas, ĉu ne? Ne, tion, ni tamen ne diras. La lingvo ne estas logiko, sed ĝi estas farajo de la homo, aŭ pli ĝuste, ĝi estas iaspeca interkonsento, ke iu signo, gesto, vorto signifos ion definitivan inter homoj. Antaŭ 50 jaroj sub la nocio « radio » oni komprenis unuavice emanadon de la suno, nuntempe laŭ interkonsento ion tute alian. Kelkfoje tia procezo estas longa. Iam la vorto **idioto** signifis en Greklando privatulon, t.e. ne ŝtatifaciston; sed ĉar la ŝtatifacistoj estis la plej inteligenta tavolo de la socio, la vorto **idioto** perdis el sia digno kaj iom post iom atingis sian nunan signifon — kun la beno de la interkonsentintoj.

Nun fine mi volas klarigi, kial tiu ĉi somera babilado pri lingvoj havas super si la titolon : « Boeuf à la Stroganoff ». Tiu-ĉi kuirartaĵo donas titolon al la plej rapida evoluo de lingva interkonsento, kiu iam okazis en la mondo.

Mi vizitis la ĉefurbon Tallinn. Tio okazis antaŭ la dua mondmilito. Mi pasigis ravan semajnon en la pitoreska, romantika kaj bela estona ĉefurbo. Mi ankoraŭ vidas antaŭ mi rondajn bastionojn de la urbo, la malnovajn stratojn, mi vidas florojn, sin balancantajn en la mara vento kaj... ritme irantajn sur la malnovaj statoj kun ridetantaj vizaĝoj. Junajn florojn! Kompreneble mia fantazio flugigas min reen en la tempo kaj krom tio helpas estona bild-almanako, kiun mi ricevis pasintjare. Ĝi povus min konvinki, ke oni povas ankaŭ nun trovi la saman agordon, la samajn florojn en la antikva estona ĉefurbo, sed eble estus pli malfacile trovi mian malnovan memon, kiu mi estis.

Tallin havis tre vigan esperanto-vivon. Mi rimarkas, ke preskaŭ ĉiu frazo donas novan temon pri aparta rakonto. Oni povis ferii en tiu urbo kaj ĝui la eksterordinaran medion, vivi en

sovaĝe fremdlingva urbo gaje, glate kaj malmulte koste, dank'al Esperanto. Se mi ne eraras, mi pasigis en du partoj dek tagojn en la urbo. Dum la unuaj du tagoj bonvolaj esperantistoj gvidis min kaj rekomendis al mi iajn manĝejojn, kie oni povis manĝi bonege kaj laŭ la sveda valuto ege malkare. La trian tagon mi decidis memstariĝi min. (Mia sekreta revo estis ĉiam alveni en « inkognito » kaj iom post iom akiri al mi socion en fremda urbo. Pri tio mi ne sukcesis en Tallinn, sed fine mi volis gvidi mem mian propran « ekspedicion » en la estona viv-arbaro.) Mi do adiaŭis miajn amikojn en la Esperanto-grupejo kaj iutagmeze mi eniris la jam konatan manĝejon. Afabla kelnero salutis min : « Tere » li diris, kaj mi respondis per la sama vorto. Pli true estis alia kelnero, estis kelnerino la unuan fojon, sed egale : mia tasko estis nun montri **al mi mem** ke mi taŭgas kiel vojaĝspertulo. Mi ricevis la menuokarton, diris « Tanan » (Dankon) kaj komencis studi la karton kun fakeca vizage esprimo. Mi komprenis nenion. Mi ne sciis, kio estas kio kaj laŭ miaj pli fruaj spertoj estis danĝere fingromontri iun manĝaĵon. (Laŭdire okazis iam pri iu, ke post tia fingro-montrado la kelnero diris : « Tion mi ne povas nun alporti al vi, sinjoro, ĉar ĝuste nun ludas ĝin la orkestro. ») Tiam mi rimarkis nomon : « Bœuf à la Stroganoff », kiu **certe** estis ia bovaĵo. Mi mendis, ricevis kaj manĝis ĝin kaj estis kontenta eĉ post la pago, ĉar, kiel dirite, ĉio estis mirinde malmultekosta en Estonujo.

La sekvan tagon mi reiris al la sama restoracio, aŭ pli ĝuste bonkvalita manĝejo, min akceptis ridetante la sama kelnero, mi rigardis la manĝokarton, kie denove nur la « Stroganoff » estis komprenebla ; despie ĉar, kiel klarigis, la kelnero parolis nur la rusan lingvon krom la estonan, kiuj du lingvoj ne apartenis al miaj specialaĵoj. Mi ricevis la saman bongustan bovaĵon.

La trian tagon mi venis en la manĝejon, la atentema kelnero alrigardis min kaj diris afable : « Jah ! Stroganoff » Kaj antaŭ ol mi vekigis el mia surprizo, mi ricevis la trian Stroganofon de mia vivo, kio ne estis malbona, sed mi komencis tamen kun iom frosta indigniĝo pensi pri la rusa generalo, kiu donis nomon al la malfeliĉa bovo trafinta mian tablon. Nu, estis la lasta Stroganoff de mia vivo. Sed la manĝaĵo, la deserto, kiun mi tamen sukcesis ricevi, estis bonaj kaj —

mi alvenis ankaŭ la kvaran tagmezon tien. La kelnero staris ĉe la pordo de la kuirejo. Mi ne diris eĉ unu vorton, ĉar mi ne havis tempon por tio, ankaŭ li ne diris eĉ unu vorton, sed alridis min, jes-gestis per la kapo kaj - - alportis la kvaran Stroganofon de mia vivo. Ĉi estis ankaŭ la lasta, ĉar neniam plu mi vizitis la manĝejon. Sed se mi estus veninta kiam ajn, tiu kapmovado

estus signifinta : « Jen Bœuf à la Stroganoff al vi, strangulo ! »

Tio estis la plej rapida (kvankam ne sufiĉe bone finiĝinta) interkonsento pri la elformado de lingva elemento inter du homoj en Tallinn, eble eĉ en la tuta mondo, pri kiu — malgraŭ la timiga fino — mi memoras kun iom da melankolio. Eble ie mi memos denove Bœuf à la Stroganoff.

ESPERANTO TRA LA MONDO

★ ★

KULTURAJ INTERŜANĜOJ. — Interŝanĝo de leteroj kaj ludiloj inter infanoj estis iniciatita de : Sro Veerendra D. Adhiya, « Prerna », Stanagar, New-Delhi 5, Hindujo.

PRELEGANTO EL NOV-ZELANDO. — Ge-sroj Hamwai, el Nov-Zelando komencas prelegvojaĝon tra Eŭropo, pri sia lando kaj la Maorioj.

La Francaj grupoj kaptu la okazon sin turnante al : U.E.F., 34, rue de Chabrol, Paris (10°).

INTERNACIA MONO. — Krom la jam kreita monunuco « steleto » « Universala Ligo » ĵus eldonis mone-rojn de 1, 5, 10 steloj, tre utilaj por la internaciaj pagoj inter esperantistoj.

ORDIGO DE GEOGRAFAJ NOMOJ. — Akademio de Esperanto kaj Internacia Geografia Asocio kreis komision por ordigo de la geografiaj nomoj en esperanto.

RADIO KAJ TELEVIDO. — Franca radio aŭdigis la poemon de Zamenhof « O, mia kor », kantita de pola artisto, dum dissendo por amatoroj de sonbendoj.

La germana televido unuafoje elsendis programon pri esperanto, en porjunula elsendo.

La bone konata Joŝiko Kafino aperis en Programo de angla stacio de televido.

FESTIVALO EN JUGOSLAVIO. — En Split la 3-a Festivalo de jugoslavaj esperantistoj kunvenigis pli ol 900 personojn el 8 landoj kaj el kiuj 400 gejunulojn.

VENEZUELO. — Fine la 1959 kaj komence de 1960 okazis pluraj esperanto-kursoj en Caracas.

DANUJO. — La dana esperanto-ligo rajtas ricevi donacojn subtrahotajn de la impostdeklaroj.

La ligo ricevis subvencion, kiel helpon por eldono de dana antologio en esperanto.

MEDICINA TERMINOLOGIA CENTRO. — La Tutmonda Kuracista Asocio starigis « Medicina Terminologia Centro »-n. Direktoro : D-ro Albault, 8, Avenue Billieres, Toulouse, Francujo.

KONGRESO DE POPOLAJ UNIVERSITATOJ. — Ĝi okazos en Strasburgo, la 9-12 de Septembro. Esperanto estas unu el la preparaj lingvoj kaj estis lastjare la unika traduka lingvo. Adreso : Sro H. Perez, 9, place de l'Université, Strasbourg.

NOVAJ LIBROJ. — En la eldonejo Stafeto, valoraĵ tradukaĵoj, en unu volumo : « Reĝo Edipo », kaj « Antigona » de Sofoklo.

Serbia E-Ligo aperigis : « Tempesto super Akonkagvo » traduko de vojaĝrakonto de Tibor Sekelj.

The Esperanto Publishing Co ĵus eldonis : « Kanako el Kananan » (aventuroj en la gangalo de Novgvineo), originale verkita de Kenneth G. Linton.

Baldaŭ aperos : « Sekretoj de la Marestaĵoj », de Petar Ĝiunio, reverkita de Marinko Givoje.

Sendu respondukuponon al Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanicka 4, Praha 12 ; vi ricevos 88-paĝajn broŝurojn pri Ĉeĥoslovako « Ĵugu mem ! »



TURISMO


BRETONIO VIN VOKAS ! (4)

Jen post 3 km la bela urbeto Le Faou kun ĝiaj malnovaj domoj, ĝia preĝejo. El la ponto vi admiras belan pejzaĝon. Grimpu ankoraŭ kelkajn km kaj vi estos en Hopital Kamfrout, kie troviĝas la minejoj de la famkonata granito de Kersanton, la plej bela el la granitoj. Tuj post la urbeto Daoulas, tre penlrinda kun ĝia malnova abatejo, maldekstre vi vidos la novan vojon, kiu kondukos vin al Plougastel-Daoulas, la lando de l'fragoj! sed precipe de la mond-fama kalvario, la plej bela certe el ĉiuj. De-truita ankaŭ fine de la milito ĝi nun estas re-konstruita dank'al la malavara monhelpe de usona komitato, kiu estis starigita nepre pro tio. Tiu ĉi kalvario ekzistis de post 1604, memore al grava epidemio de pesto, kiu furiozis sur la tuta regiono en 1598, kaj ĝi precipe estas rimarkinda pro la abundeco de ĝiaj artaj skulptaĵoj (180 entute). Ni nun iru ĝis la pontego, kiu supervojas la riveron Elorn : la ponto de Plougastel ankoraŭ dirita : ponto Albert Louppe, konstruita de 1926 ĝis 1930. Admiru ĝin ĉar ĝi estas en la tuta mondo la plej bela, la plej grava konstruita el armita betono. Kvar statuoj el kersanton-granito ornamas ĝiajn angulojn. Laŭiru ĝin sed kiel eble plej malrapide por ne perdi la plej etan parton de la admira aspekto de tiuj grandiozaj pejzaĝoj, kiuj elvolviĝas ambaŭflanke antaŭ viaj okuloj...

Vojaĝante laŭlonge de la nordaj marbordoj ni alvenas al Morlaix, bretonlingveMontroulez, inter la piedoj de speco de monstra mirapodo el ŝtono, la duetaĝa fervoja pontego, kiu per siaj 22 arkaĵoj, 64 m. alta, 284 m. longa, transpaŝegas la profundan valon ĉe kies fondo kuŝas la malnova pentrinda kaj ofte pentrita urbo.

Nun antaŭen ! Ni iru suden grimpante la vojon kiu kondukos nin al la longa Arez montaro, kiu traboras la plej grandan parton de nia departemento. Baldaŭ, post Ploneour-Menez ĉe la dekstra flanko, blunigra akra ŝtonaro starigas, la Trevezel roko, la plej bona belvidejo certe en tuta Bretonio. Rapide, facile ni surgrimpu ĝin. Ĝi staras meze de densejo kie abunde kreskas rozkoloraj erikoj, mirteloj, kiuj proponas al vi stajn bonodorajn vakcinojn, flavaj genistoj kaj oraj uleksoj. Sendube jen estas la plej imponaj el ĉiuj bretonaj pejzaĝoj, tiu, kiu prezentas la plej vastan panoramon. Norde, la Leon ebenajo amplekse disvolviĝas kaj ebligas vidi dekojn da elegantaj pintoturoj. Pli malproksime la Manĉo, sur pli ol 50 km., ondume briletas ĝis la Sankta Matejo-terpinto, la Bresta Rodo. Sude la vidado portas ĝis la nigraj Montoj. Ankoraŭ kelkajn kilometrojn kaj ni haltas ĉe la piedo de la Monto Sta Mikaelo kun ĝiaj 391 m., la plej alta en Bretonujo. (Ne samigu ĝin kun la alia Monto Sta Mikaelo inter Bretonio kaj Normandio !)

Ni surgrimpu ĝin ! Sur ĝia supraĵo malnova kapelo de la paŝtisto...



Keriote'a kapelo apud Concarneau
(Kliso Ouest-France).

admirinda kaj vasta. Apude, kio estas tiu larĝa akvotavolo ? Ĝi vere ĝi estas artefarita lago, kreita de barajo por elektrozino.

Ankaŭ kelkaj jardekoj en ĝia nuna loko kuŝis la mistera kaj teruriga Elez-Marĉo kiun la bretonaj legendoj nomas la lando de la inferentaj. Tie troviĝis la profunda granda truo « Judigo » unu el la inferentaj !... Pensanta pri tio, tremu timena legantino !...

R. MARTIN. (Daŭrigota)

...staras la
...ti tie la pejzaĝo estas

DU GRANDAJ URBOJ

SUR LA RIVERO SEINE

ROUEN. — Rouen kuŝas sur la konkava bordo de buklo de la Seine. Du alfluentaj riveretoj (Robec kaj Cailly) fosis duonbasenon antaŭlonge protektatan de sufiĉe krutaj kaj arbarumaj deklivoj. Ĉiam la tajdo suprenfluis ĝis tiu loko. Tiu natura baseno sendube estis okupata de marĉoj, je granda parto, sed prezentis al la antikvaj popoloj, kiuj tie loĝis tiun superecon, ke iliaj loĝejoj konstruitaj sur fostegaroj tiel estis pli bone defendeblaj.

Dum la unuaj jarcentoj, la loĝantoj de Rotomagus (antikva nomo de Rouen) jam uzis la riveregon por komerci. Dank'al la romana paco, la komunikado estis sekura kaj okazis regulaj


transportadoj inter la diversaj Eŭropaj landoj: Italujo, Britaj Insuloj, k.t.p. Je la 3-a jarcento rektangula remparzono protektis la urbon. Je la X-a jarcento, Rouen plurfoje estis rabadata de la Normandaj piratoj.

Ĉe la fino de la centjara milito, post la morto de Johanino d'Arc, bruligita en Rouen en 1431, la normanda provinco komencas ĝui relativan kvieton, post la konfuzoj kaj la mizero de du jarcentoj. Sub la reĝardo de Henriko la IV-a, la drapindustrio estas minacata de la angla konkuro, kaj la komercio frontas la potencon de la Nederlandanoj kaj Anglio. Dum la XVII-a jarcento, la militoj de Ludoviko la XIV-a okizigas novan komercan malfortiĝon, sed la urbo jam pli grandigis. Je la 18-a jarcento la industria inklino de Rouen precizigas. La ŝtofoj el kotono (Rouen-ajoj) akiras grandan famon. Aliaj fabrikoj, el kiuj ceramiko, ankaŭ malvolvigas.

Rouen multe suferis pro la brulegoj kaj la 120 bombardoj de la milito. La urbo-planisto Jacques Greber ellaboris la planon de la urbrekonstruado. Oni provis renovigi la malsanajn kvartalojn kaj oni ankaŭ estas rekonstruanta altajn domegojn.

La havena antaŭdestino de la pejzaĝo estis markata de ĝia submara reliefo, kaj la haveno de Rouen kuŝas nur je 40 km. de la loko kien la mara akvo alfluas. Sur la dekstra bordo oni povas vidi la basenon St Gervais kaj sur la maldekstra kvar basenojn kaj 8 km. da kajoj. De post 1846, la navigebla parto de la rivero estis iom post iom reguligata por prezenti ĉian minimuman larĝecon 1.000 m. Ĉe la suda bordo estis konstruata konkava digo. La haveno baldaŭ perfektigis pri sia ekiparo kaj precipe per plilongigo de siaj kajoj.

Rouen kaj la suburboj havas 275.000 loĝantojn. Rouen estas la 3-a mara haveno post Marseille kaj Le Havre kaj la dua rivera haveno post Strasbourg. Sur la dekstra bordo kuŝas la stacidomo, la katedralo, ĉiuj historiaj monumentoj, la urbodomo, k.t.p. La novaj kvartaloj kuŝas en la meza parto. Tiuj de la maldekstra bordo prezentigas laŭ ventumil-forma vojaro. Novaj satelitaj civitetoj estis kreitaj en la suburboj, sed 4 « spacoj » estas rezervataj por la fabrikejoj.




Rouen. - Malnovaj domoj

(Kliŝo S.I. Rouen)

De post 1701 la ŝpinado de la kotono mal-voviĝas en Normandio, sed tiu industrio nun ŝajnas kapabla fronti la eblajn konkuradojn de la « komuna merkato ».

Je la komenco de la 19-a jarcento Léon Maletra instalas en la Rouena ĉirkaŭurbo fabrikon de sulfura acido. Nune oni trovas ĉe la sudo de Rouen proksimume dek ĥemiajn fabrikegojn. Oni



Rouen. - La katedralo

(Kliŝo S.I. Rouen)

fabrikas sterkojn, kolorigaĵojn... Elektra tekniko estas reprezentata de du societoj kaj aliaj metalurgiaj fabrikoj produktas diversajn. Kvar grandaj paperfabrikoj estas instalitaj sur la maldekstra bordo.

Petrolindustrio estas la plej nova branĉo. La fabriko Shell en Rouen estas la 5-a en Francujo.

La kultura ekipaĵaro de Rouen estas unuaraŝa : lernejoj pri juro, sciencoj kaj literaturo, medicino kaj farmacio, lernejo pri muziko, supera lernejo pri komerco, k.t.p...

Ĝiaj aroj de artaj ferumaĵoj, pentraĵoj kaj ceramikaĵoj havigas al Rouen la nomon « Muzeo-

urbo ». Ni citu : statuon de Johanino d'Arc, la preĝejo St Maclou, grave difektitan en 1944, la Justic-palaco, la hotelon de Bourgheroulde, la « dikan horloĝon », kiu transpaŝas straton, k.t.p. kaj precipe la katedralon ; ĝi jam ekzistis en 1230 ; ĝia stilo estas gotika flamstilo. Ĝi estis grave vundita ĉe sia suda flanko dum la bombaradoj en 1944. La supraĵo de la lanternturo situanta je 151 m. alte tiam preskaŭ falis. Unu el la turoj (la Buter-turo) entenas sonorilaron el 56 sonoriloj, la plej kompletan en Eŭropo. La katedralo estis remalfermita je la 24-a de junio 1956.

Antaŭ la foriro estas bone promeni laŭ la « korniĉo ». De tie oni vidas la tuton de la urbo kaj povas ĝin adiaŭi.

M.-Th. JUCHAULT.

LE HAVRE. — Se vi deziras bone koni urbon, la plej trafa rimedo estas laŭiri ĝiajn stratojn, prefere piede, kun ĉiam preta okulo, ĉiam atenta spirito. Sed Le Havre estas malfacile penetrebla, eble pro ĝia norda klimato, ĝia ofte nebula ĉielo en kiu glitas pala suno. Iom da pacienco estos necesa por konatiĝi kun ĝi. Ĝi fakte ne estas malnova urbo : de post la katastrofo de 1944 okaze de kiu la urbo kaj la haveno preskaŭ malaperis, vigla, kuraĝa konstruado faris ĝin nova.

Antaŭ la 7-a de Februaro 1517, dato de la naskiĝo de la haveno laŭ ordono de Francisko 1-a, la haveno de Harfleur okupis la bordon nordan de la elfluejo de la rivero Seine, fronte al Honfleur kiu okupis la sudan bordon. Multaj estis la malfacilaĵoj kaj granda la kuraĝo de la konstruantoj. En 1525 granda ventego faligis la murojn, forportis la ŝipojn kaj mortigis centon da personoj. Longtempe Le Havre nomiĝis Françoise de Grâce.

Dum jarcentoj la historio de Le Havre estis nun paca, nun malpaca sed la urbo pligrandiĝis. Post la Revolucio kaj la Imperio ĝi atingis sian apogeon. La urbo diskreviĝis. La inĝenieroj ne interesiĝis pri la pasinteco. Ili rigardis al la estonto kaj la malnovaj ĉirkaŭaj muroj kaj pordoj estis faligitaj. En 1939 Le Havre estis granda urbo kaj en ĝia haveno, staris « Normandie » la plej bela kuriersipo en la mondo. En 1944, 10.000 konstruaĵoj estis malaperintaj, multaj aliaj grave vunditaj ; la haveno estis tute neutiligebla, La Havre-anoj, el kiuj 80.000 estis senhejmaj, kuraĝe turnis novan paĝon de la historio de sia urbo.

Elirante el la vasta stacidomo, la vojaĝinto vidas antaŭ si la longan Boulevard de Strasbourg, kies altaj konstruaĵoj datumas de 1900. Ĉe la fino de tiu bulvarado, subite, ĉio aliĝas : tie ko-

menciĝas la nova urbo. Al la maro, al la Oceana Pordo, iras la larĝega avenuo Foch, en kiu reĝas la floroj kaj arboj kaj kiu estas flankumita de altaj sentegmentaj helaj kaj modernaj konstruaĵoj. Dekstre la urbodomo suprenpuŝas al la ĉielo sian 72-metran turon. La Oceana Pordo, ŝirmita de la maraj ventoj, montriĝas per du dektrietaĝaj turoj. Irante maldekstren al la haveno, ni admiras la novan preĝejon Sta Jozefo, kies interno estas mirinde hela, kiam la suno ludas tra la multegaj diverskoloraj vitraĵoj de ĝia 106-metra turo.

Du malnovaj preĝejoj postvivis la detruadon: Nia Sinjorino apud la Mara Fronto kaj S-ta Francisko, meze de malnova kvartalo kie ankoraŭ vidiĝas malnovaj pitoreskaj domoj. En unu el tiuj domoj situas la muzeo de la malnova Le Havre. Tute proksime etendiĝas la haveno. Sed antaŭ ol viziti ĝin, ni iros al Sainte Adresse, de kies monteto la spektaklo estas vere vidinda: la promenanto povas super-rigardi la urbon, la havenon kaj la radon. Ni pluiros kaj ne bedaŭros la promenadon ĉar baldaŭ aperos la abatejo de Gravelle. Tiu romanika konstruaĵo entenas muzeon de mezaĝaj skulptaĵoj kaj arkeologio. Ioma vagado sur la terasoj parmesos al ni vidi la elfluon de la rivero Seine.

Ni revenu al la haveno. Ĉiam emociiga estas la vizito de granda haveno. Kaj granda estas tiu ĉi; ĝi posedas 19 kilometrojn da kajoj, kvin pasaĝer-staciojn kaj 200 gruojn. La tuta surfaco de la remizoj kaj magazenoj estas 480.000 m². La koton-magazeno, la plej granda en Eŭropo estas 740 metrojn longa kaj 113 metrojn larĝa. Ni promenu laŭlonge de la bruplenaj kajoj, ni rigardu la ŝarĝboatojn kiuj malpleniĝas, ni admiru la elegantan situeton de la gigantaj diversnaciaj kurierŝipoj, kiuj baldaŭ foriros al ĉiuj radoj en la mondo. Le Havre dua haveno en Francujo!



Le Havre. - La nova urbo

(Kliŝo S.I. Le Havre).

Kompreneble la unuaj industrioj zorgis pri konstruado de ŝipoj kaj diversaj haven-materiaĵoj. Poste diversaj aliaj industrioj kreiĝis kaj la Havre-a industrio pli kaj pli progresis. Petrolo fariĝis unu el la riĉo-fontoj de tiu urbo. En specialaj dokoj oni ĝin malŝargas kaj poste sendas per ŝipoj aŭ per oleoduktoj al la pariza regiono kaj al la rafinejoj de la Seine-valo.

La ĵuskonstruita ponto de Tancarville, la plej granda vojponto en okcidenta Eŭropo multe helpas al la progresado de la urbo ĉar ĝis la konstruo de tiu ponto ekzistis nur pramŝipoj por transiri la riveron inter Rouen kaj la maro. Certe tiu granda realigo plenumos la esperojn de la Havre-anoj.

(Resumo kaj traduko de artikolo de P. M. CHOTEL).



La vivo

en la

Esperantista

Kulturdomo

Angulo de unu manĝo-ĉambro

El ie en la Mondo

Kongresoj aŭ festivaloj ?

Esperantistoj ofte kongresas en la internacia kaj nacia kadroj. Ni en Jugoslavio ŝatas inventadi novajn organiz-formojn kaj ankaŭ niaj kongresoj fariĝis la celo de nia reformo-febro. Anstataŭ kongresojn ni nun dum du sinsekvaj jaroj organizas la naciajn kulturajn Festivalojn, kiuj bonege sukcesas. Niaj Festivaloj estas parado de juneco. En la programo partoprenas nur infanoj kaj junuloj kaj laŭ la ekstera aspekto ili estas demonstro de amaseco. Pasintan jaron la festivala urbo estis la sommerrestadejo Opatija kaj ĉi jare la havenurbo en Dalmatio, Split. La festivala tempo estas la Unuamajaj tri festotagoj, kiam, vere, ĉiuj trafikiloj estas plenplnaj, vendejoj fermitaj, ekskurs-kaj ripozlokoj tre serĉataj, sed ĉio ĉi ne malhelpas esperantistojn amase viziti siajn Festivalojn. La ĉifara en Split altiris 900 personojn. Pli ol 400 gejunuloj defilis sur la scenego de la nacia teatro en Split, kiu dum du tagoj estis disponigita al esperantistoj. Infanoj el la elementa lernejo, gimnazianoj, junuloj kaj studentoj prezentis siajn programe-rojn, ili kantis, dancis, deklamis, aktoris dum plenaj du tagoj en kvinparta programo nur en Esperanto. Dum du tagoj en la teatro de Split sonis nur la esperanta vorto kantita, deklamita aŭ aktorita. Tiu fakto pruvis

al ĉiuj vivantecon kaj uzeblecon de la lingvo por ĉiuj formoj de la kultura manifestiĝo. La solaj ne junuloj. kiuj partoprenis en la festivala programo, estis la membroj de la granda fervojista kant-horo « Cvetković » el Beograd kaj la aktoroj de la bulgara teatra trupo el Sofia, kiuj per la bonega prezentado de la komedio « Ĉasantoj de oficoj » tre altigis la kvalitan nivelon de la programo.

En la kadro de la Festivalo okazis ankaŭ la Literatura kaj la Oratora konkursoj. Tri junaj oratoroj entuziasmigis la publikon kaj vere meritis la tondra aplaudon pro sia lerta, enhavoplena kaj temperamenta oratorado.

Al la Festivalo, kvankam nacia, ne mankis la internacia koloro. Krom la bulgara teatra trupo, partoprenis ĝin ankaŭ la grupoj aŭ unuopuloj el Aŭstrio, Germanio, Italio, Danlando kaj Belgio. Ili ĉiuj esprimis sian kontenton pri la Festivalo kaj ni firme kredas ke iliaj flataj vortoj ne estis nura gesto de ĝentileco.

EMILIJA LAPENNA.

Ĉefdelegito de U.E.A. en Jugoslavio.

LA AERA PEND-TRAJNO


Tiu sensacia franca invento estis prezentita en Châteauneuf-sur-Loire. Tiu unurela trajno ŝajne alportas solvon al la problemo de la malobstrukcado de la urboj. Per ĝia interna amplekso kaj ĝia rapideco, ĝi estus ege taŭga por veturigi al la centro de la urbegoj la multegajn suburbanojn kiuj ĉiumatene venas al la ĉefurbo por labori kaj samtempe eviti la obstrukcadon de la aliaj vojoj.

La rulvojo konsistas el metala trabo. La rigideco de tiu rulvojo ebligas konstrui subtenilojn nur ĉiun tridekan metron, kaj tiel havi duoblan aeran vojon super la jam ekzistantaj vojoj. La surtera surfaco okupita de la subteniloj estas malgranda (baza circolo 80 cm diametro ĉiun tridekan metron.)

15 milionoj da novaj frankoj po kilometro da vojo. La kutima sub-

tera urba trajno kostas 70-100 milionoj da novaj frankoj po kilo-

metro. Pluraj aliaj landoj multe interesiĝis pri tiu prezentado.



La kosto estas 12 aŭ

AŬTUNE TRA ISRAELO (fino)

Ni veturis antaŭen, ĉiam laŭ tiu asfalta ŝoseo, kondukanta sur suprojn de la montoĉeno, kun vasta ĉirkaŭrigardo al ĉiuj flankoj. Ni haltis en punkto, de kie estis videbla en malproksimo la mediteranea maro kaj aliflanke la lago Kineret, kiun oni tra la mondo nomas lago Tiberias aŭ laŭ la Biblio: Maro Galilea. Ni revenis tra Nazaret, kiun mi al vi jam priskribis en unu el miaj antaŭaj leteroj. Tiun ĉi fojon ni trinkis kafon en unu primitiva kafejo de Nazaret. Ni ne volus preterlasi mencion de giganta, ĵus finkonstruata tekstilfabriko en nova parto de Nazaret. Miaj okuloj apenaŭ povis trovi, kie finiĝas la maro de ĝiaj tegmentoj.

Post plenumo de tiu ĉi granda ekskurso komecas serio de prelegoj. Ili okazas en la sama Ohalo apud la lago Kineret, kiun mi jam foje vizitis kaj pri kiu mi al vi jam rakontis. Nun ankaŭ mia edzo konatigis kun tiu ĉi paradiza angulo. Ĝi estis nunan fojon plena de aliaj floroj kaj brilis en aliaj koloroj. La kapon de la monto Hermon ne plu kovris neĝo kaj en la lago Kineret ni ĝuis plej agrablan banadon, kvankam post nemultaj tagoj venos novembro. Al nia manĝejo ni iradis tra longa koridoro, kies tegmenton formis floraro de flamanta bugenvilo. Ĉie estis dissemitaj benkoj por ripozo, sed iam ni preferas kuŝiĝi sur alta mola tapiŝo de herbejo inter palmoj, kun lago antaŭ la okuloj.

Famaj personoj de publika vivo parolis al ni tie pri Israelo laŭ plej diversaj aspektoj. Ofte ni malfacile povis disigi de la parolintoj, bedaŭrante finon de la prelego kaj ilian foriron. Ni ŝatis aŭskulti, eĉ se oni iam daŭrigis ankaŭ post la vespermanĝo por plenumi la antaŭviditan programon.

Cetere oni zorgis kompreneble pri abundaj paŭzoj. Unu el ili estis eĉ tuttaga. Mi bone konscias, ke miaj kapabloj estas nesufiĉaj, por priskribi al vi konvene la neforgeseblajn belajn, kiujn ni vidis dum tiu tago. Ni traveturis unu el la plej pentrinaj partoj de Israelo, ĉiam en proksimo de lago Kineret. La naturo, homaj mano kaj intelekto kunigis por krei plej fortan impreson.

Mi devas citi ĉi tie grandan modernan amfiteatron, starantan ĉe suda bordo de la lago, laŭ stilo kaj konstrumaniero io unika. La muzikhalo en Ejn Gev sur orienta rando de Kineret prezentas al trimil aŭskultantoj kelkfoje dum la jaro brilajn koncertojn. Kolektigas tie muzik-entuziasmoj el ĉiuj partoj de Israelo kaj regule ankaŭ multaj eksterlandanoj. Oni fieras en Ejn Gev pri perfekta akustiko, kiun kreas la situo inter montoj kaj lago.

Ne sole la kuraĝuloj, sed preskaŭ ĉiuj partoprenantoj de la ekskurso ĝuis agrablan banon en varma lago. Post bona malvarma lunĉo la aŭtobuso nin transportis al la montoj super Ejn Gev ĝis limo de Sirio unuflanke kaj de Jordanio sur flanko alia. Kiel eta estas Israelo kaj kiel proksimaj en ĉiuj direktoj estas ĝiaj landlimoj!

Memorinda estas la digna monumento de mortintoj, staranta meze de kvetigita verdaĵo, kun montoj kaj blua lago en la fono.

Mihael, gvidanto de Chalo, kondukis nin tiam al la proksima kibuco Afikim, kies membro li estas kaj kie loĝas lia familio, Estas kibuco industria, kiu sin dediĉas al prilaboro de ligno. La materialo estas kolosaj arbotrunkoj el Afriko. Homoj ĉirkaŭas vicojn da sagaciaj maŝinoj, premas diversajn butonojn kaj levilojn kaj ĉio aspektas kiel ludo. Pretaj delikataj kaj valoraj produktoj amasiĝas bele ordigitaj en altegaj staploj, starantaj en apudaj haloj. Ĉio en tiu ĉi grandega kaj impona fabriko estas farata sen fortoŝtreĉo, ĉie maŝinoj helpas la homon. Surskriboj sur transportpreta varo montras, ke la produktoj estas destinitaj al plej diversaj lokoj de la mondo.

Blanka motorŝipo nin prenis sur sian ferdekon kaj ni ĝuis post tiom da impresoj trankvilan hejmenveturon. Hejmo ni tiam nomis nian Chalo.

La lastan tagon oni montris al ni la historie interese ĉirkaŭaĵon de Chalo, elfosaĵojn el diversaj jarmiloj: Restajoj de grenejo, kiun konstruis antaŭ proksimume 5.000 jaroj kanaanidoj, fundamentoj de antikva hebrea preĝejo, partojn de banejo, kiun fondis tie romianoj sur varmaj fontoj tie sprucantaj kaj postsignojn de kristana baziliko el epoko bizanca. Nekalkuleblaj generacioj tie klopodis, sed ĉion trafis la sama sorto: detruo kaj pere. Ni sentas vanecon de ĉio homa kaj tristo ekregas niajn pensojn. Nur forto de Naturo montris sin eterna. Vigle spruca fonto, kiu antaŭ miljaroj varmigas banon de romiaj nobeloj, bolas ĝis hodiaŭ. Vaporo levas sin super ĝi.

Ni transiras ŝoseon kaj ni estas en arbaro de daktilaj palmoj, apartenanta al najbara kibuco. Unu el ĝiaj membroj al ni rakontis, kiel malsimpla estas kulturado de daktilpalmoj. Se oni volas havi bonan rikolton, oni devas zorgi pri la arbo ekde ĝia eksto. Polenon de viraj arboj oni transportas al la virinaj. Tiuj ĉi « patrinaj » nutras la junajn plantojn sur siaj korpoj. Deknailojn da tiuj ĉi iliaj « gefloj » oni plantas en la sudaj, dezertaj regionoj de Israelo. La daktilojn kreskantajn en grandaj grupoj alte sur la palmoj, oni fermas en najlonajn sakojn, por ilin protekti kontraŭ falo, kontraŭ birdoj kaj aliaj danĝeroj.

Ni venis ĵus dum rikolto. Sub unu el la arboj sidis majesta maljunulo kun longega blanka barbo. Li direktis la laboron. Homoj forhakis supre la berarojn, aliaj kolektis la sakojn, malfermadis ilin, forkusis la daktilojn sur pladojn kaj ŝargis ilin sur aŭtomobilojn. En sia rapida laboro forjetadis la rikoltantoj tigojn, sur kiuj restis ankoraŭ sufiĉe da bongustaj, sukaj daktiloj. Ilin kolektis ni, sed krom tio invitis nin la maljuna ĉefulo ĉiam denove, ke ni prenu fruktojn ankaŭ de la pladoj. Kiam li aŭdis de mi, ke ni havas hejme nepinon Tamar, li plenigis mian mansakon. Ili estu lia donaco por ŝi. « Tamar » signifas en hebrea lingvo « daktilpalmo ».

En tiu vespero oni regaligis nin per riĉa festeno — vegetara kompreneble kiel ĉiam antaŭe — kaj dum ĝi ni reciproke adiaŭis. Kiam ni matene forveturis el Ohalo, ni sentis, ke parto de nia koro restis tie.

MIRJAM GINZ.

Tra la Esperanta Literaturo

UNUAJ PASOJ — KABE D-ro KAZIMIERZ BEIN

D-ro Kazimierz Bein, kiu famiĝis sub la pseŭdonomo Kabe, naskiĝis en 1879 kaj mortis en 1959. Li estis pola okulkuracisto. En siaj junaj jaroj li miksiĝis en kontraŭrusan movadon, pro kio li estis ekzilita dum pluraj jaroj. Tial nur en 1899 li finis siajn studojn en Kazan. Li fondis la Varsovia Instituton por okulmalsanoj, kies direktoro li estis, kaj la Polan Oftalmologian Societon. Li parolis plurajn naciajn lingvojn.

Kabe famiĝis per la traduko de la « Fundo de l'Mizero » de Sieroszenski, kiu aperis en « Lingvo Internacia » en 1904. Ekde 1900 li estis vicprezidanto de la Akademio.

Li ne verkis originale ĉar li opiniis, ke la lingvo profitas pli multe per la tradukado, ol per originala verkado. (Ni memoru, ke li verkis dum la unuaj jaroj de Esperanto.)

La verkoj de Kabe estas : La interrompita kanto (Orzesko), Pola antologio, Elektitaj Fabeloj (Grimm), Unua legolibro (ideala legaĵo por la kursosoj), versaĵoj en prozo (Turgenev), Patro kaj Filo (Turgenev) kaj ĉefe La Faraono (Prus). La tri volumoj de tiu verko temas pri antikva Egiptujo, kiam la pastraro kaj la konprinco volis akiri al si mem la plenpotencan.

En ĉiuj siaj tradukaĵoj la proza stilo de Kabe estas simpla, klara kaj eleganta. Li skribis agrablan kaj facile legeblan lingvon.

ENBALZAMIGO DE LA FARAONO (el la Faraono de Prus. trad. Kabe)

Tiam al la ŝipeto alkuris aro da pastroj : ili elprenis la kadavron de l'faraono, metis ĝin sur marmora tablo, kvazaŭ Ozirison por ripozo post la taga laboro. Nun al la mortinto proksimiĝis paraŝito, alivestita kiel la Dio Tifono. Sur la kapo li havis teruran maskon kaj vilan flavruĝan perukon, sur la dorso haŭton de apro, kaj en la mano ŝtonan etiopian tranĉilon. Li komencis rapide detranĉi la mortinto...

« Mi skrapas la piedojn de mia frato Oziriso, por ke li ne malpurigu la ĉielon per la tera polvo. Fortranĉite la plandojn, la paraŝito prenis kurban metalfadenon, metis ĝin en la nazon de la mortinto kaj komencis eltiri la cerbon. Poste li distranĉis la ventron kaj tra la truo eltiris la intestojn, koron kaj pulmojn. Dume la helpantoj de Tifono alportis kvar grandajn urnojn, ornamitajn per la kapoj de la Dioj kaj en ĉiun el la urnoj metis iun internan organon de l'mortinto...

Post sepdek tagoj oni enmetis la korpon en ŝtonan tubon, tra kiu dum kelke da tagoj pasis varmego aero, kaj sekiginte ĝin oni ĝin transdonis al la enbalzamigistoj. Nun komenciĝis la plej gravaj ceremonioj, kiujn sur la faraono plenumis la plej altaj pastroj de la kvartalo de la mortintoj... La korpon de la mortinto, turninte la kapon al la sudo, oni

lavis per sanktigita akvo, kaj ĝian internon per palma vino. Sur la planko sursutita per cindro, sidis larmistinoj, kaj elŝirante al si harojn, gratante al si vizaĝojn, ploris la mortinton. Ĉirkaŭ la funebra lito kolektiĝis pastroj alivestitaj kiel dioj : Izido, nuda, kun la krono de la faraonoj, la junulo Horus Anubis kun ŝakala kapo, Tot kun birda kapo kaj kun tabuleto en la mano, kaj multaj aliaj.

Sub la kontrolo de ĉiu tiu respektinda aro, specialistoj komencis plenigi la internon de l'mortinto per forte odorantaj herboj, segaĵoj, kaj eĉ ili verŝis tien odorajn arban sukojn, seninterrompe preĝante. Poste, anstataŭ liaj propraj oni metis al li vitrajn okulojn, enkadrigitajn en bronzo. Oni surŝutis la tutan korpon per soda polvo...

Ĉiun manon kaj piedon, ĉiun fingron oni ĉirkaŭvolvis per rubandoj sur kiuj estis skribitaj preĝoj kaj ĵuroj. Sur la brusto kaj sur la kolo oni metis tutajn manuskriptojn de la « Libro de la mortintoj »...

◆◆◆

Antoni GRABOWSKI

(Ni ricevis de S-ano Zygmunt Grabowski la ĉi-suban leteron, kiun ni, kun plezuro, publikigas. Ni dankas S-anon Z. Grabowski).

En via leginda kaj valora revuo (N-ro I, Januaro-februaro 1960), en la artikolo « Tra la esperanto Literaturo » koncernanta mian patron Antoni Grabowski, troviĝas, eksterdube sen kulpo de la Redakcio, iaj neĝustaj, kiujn mi, kiel sola el la tuta familio restinta filo, deziras korekti.

Antaŭ la eksplodo de la 1-a mondmilito mia patro Antoni Grabowski ek troviĝis ekster la tiama rusa imperio, ĉar en Julio 1914 li forveturis por kuraciĝi en Truskawiec, kuracloko aparteninta tiame al la Aŭstra-Hungara imperio. La militeksplodo surprizis du lin ekster Varsovio, kie li estis konstante loĝanta dum pluraj jardekoj kune kun sia tuta familio.

Mia Patro, samkiel lia tuta familio, estis radikala pola kaj pola patrioto. Pro la siatempa dispartigo de Pollando (fine de la 18-a jarcento) Pomeranio kaj la Grandduklando Poznanio ek troviĝis, teritorie aneksitaj, en la Germana Imperio.

Sekue, la gepatroj de mia Patro, kaj do ankaŭ li mem, estis nur germanaj ŝtatanoj, sed ne germanoj, ĉar ili sentis kaj deklaris sin poloj flegante ĉiam la polajn tradiciojn kaj kulturon.

Kiel danaska pola mia Patro adaptis al la Esperantista literaturo veran ĉefverkon de la pola poezio — la nacian eposon de Adam Mickiewicz « Sinjoro Tadeo » — por ebligi al aliaj nacioj ekkonon de tiu perlo de la pola literaturo. Dank'al tio, la popoloj de fora Oriento, kiel ekz. japanoj kaj ĉinoj — esperantistoj — unufoje ekkonis « Sinjoro Tadeo »-n, kiu estis kaj ĉiam estas la plej fama kaj plej bela pola eposo.

NIAJ POĖTOJ



ISTOJ

OPTIMISTO

Optimist'mi estas, Mi tro

Coja-vide vivon vidas,

Ruĝkoloraj okulvitroj

Sur nazpinto mia sidas.

Fiaj agoj, justoj juĝaj,

Homoj, ajoj malperfektaj...

En vitretoj miaj ruĝaj

Havas formojn belaspektajn !

PESIMISTO

Mi naskiĝis pesimisto,

Mi nek vivas kaj nek mortas,

Nigrajn vitrojn mi kun tristo

Sur nazpinto mia portas.

Homo estas akcipitro,

Vivo estas ploro ĝema,

Fulge-nigraj okulvitroj

Mian nazon tre surpremas.

REALISTO

Mi nur estas realisto

Sen meditoj pri banaloj

Por mi Dio kaj Mefisto

Estas du konkretaj maloj.

Por mi litro estas litro,

Diagramo — diagramo,

Do senvitrajn okulvitrojn

Mi nur portas por ornamo.

BONVENON !

En cerbo regardis trankvila racio,

Ĉeletoj kaj pensoj bonfartis,

Subite en cerbon tra l'fend' en krano

Peceto de plumbo ensaltis !

En cerboj, en molaj — pecetoj malmolaj,

Bonvenon ! Ho kia surprizo !

Bonve !... kaj ne finis pensetoj frivolaj :

tonigis en mort ... paralizo !

Eŭĝeno Matkowski.

FANTAZIAĴOJ

La Insulo de l'Okcidento (1-a parto)

El la anglalingva originalo de JOHN MASEFIELD

esperantigita de A. J. L. HUGES

je la afabla permeso de la verkinto

Iam estis du maristoj ; unu el ili nomiĝis Joĉjo, la alia Jerĉjo. Ili estis fiŝkaptistoj, kaj ili havis junan metlernanton, kies nomo estis Jakĉjo. Joĉjo estis drinkemulo, kaj Jerĉjo amegis sian pipon ; Jakĉjo faris la tutan laboron, kaj la du estroj bata-dis lin. Nu, iutage Joĉjo kaj Jerĉjo estis en la vilaĝa trinkejo, kie troviĝis juna pastro, rakontanta al la ĉeestantaro pri alilandajoj, pri strangaj vegetaĵoj, kaj tiel.

« Ha » li diris, « kiel mirindaĵojn oni trovas, okcidente ! »

« Kiajn mirindaĵojn, pardonpetante, Sinjoro ? » demandis Joĉjo, « kiaj mirindaĵoj eble estus tie ? »

« Nu, ĉiaj mirindaĵoj », respondis la pastro ; « okcidente troviĝas tiaj aĵoj, pri kiaj oni neniam kredus. Ne, neniam oni kredus pri ili, krom vidinte li diris : troviĝas diamantoj, kreskantaj sur la arbo-branĉoj ; kaj grandegaj, oraj, brilaj perloj, vulgaraĵ kiel pezpaĵloj. Kaj okcidente troviĝas insuloj — ho, dum horoj mi povus rakontadi pri ili ! Cu insuloj ? Je mia vorto, en tiuj oceano estas insuloj kiuj pigmeigus viajn normandajn insulojn, vian Aldernejon, vian Sarkon, eĉ Britujon mem ».

« Kiaspecaj insuloj estus ĉi tiuj, pardonpetante, Sinjoro ? » diris Jerĉjo.

« Nu, respondis la pastra ulo », Insuloj, Insuloj grandaj kiel Hispanujo. Insuloj enhavantaj riverojn da rumo kaj riveretojn da smilaksuko. Kaj nenio troviĝas simila al viaj rozoj ; la rolon de rozoj en tiuj landoj ludas rubenoj kaj ametistoj. Orajn tiĝojn ili havas, kaj grandajn diamantajn stipojn ; se oni mangas ilin, ili gustas same kiel prokkrusto. Jen tiaj rozoj, kiajn oni dezirus hejme ! li diris.

« Kaj kio alia troviĝas tie, Sinjoro, pardonpetante ? » diris Joĉjo.

« Nu », li diris, la pastro diris, « estas ja mirindaĵoj. Ne nur mirindaĵoj estas mirakloj ! Ne nur mirakloj, eĉ spiritoj ! »

« Kiaj spiritusoj estus ĉi tie, pardonpetante ? » demandis Jerĉjo ; « ĉu rumo kaj tiel ? »

« Mi diris 'spiritoj' », diris la pastro ; « mi aludis al fantomoj ».

« Ho, kompreneble », diris Joĉjo, humile.

« Jes, fantomoj, daŭris la pastro ; kaj, aludante al fantomoj, mi signifas spiritojn. Kaj, rilate al Spiritoj, mi signifas blankaĵojn. Kaj, rilate al blankaĵoj, mi signifas aĵojn, kiaj blankigus al vi la harojn. Ankaŭ tie troviĝas ruĝaj demonoj, kaj blujaj demonoj, kaj altstatura, blonda reĝino, kiu atendadas ĝis iu viro kisis ŝin. Kaj la unua ulo, kiu kuraĝos kisi ŝin, iĝos la reĝo, kaj ĉiuj ŝiaj plensakoj da oro apartenos al li ».

« Pardonpetante, Sinjoro », diris Jerĉjo, « sed ĉirkaŭ kie oni trovas insulojn ? »

« Nu, okcidente, respondis la pastro, okcidente, apud la sunsubiro ».

« Ha », diris Joĉjo al Jerĉjo, « kiaj mirindaĵoj ekzistas en la mondo ! »

Nu, post tio la du friponoj pensis pri nenio, krom tiuj insuloj. Finfine, ili forpuŝis sian fiŝboaton, kaj ekiris por elserĉi ilin. Joĉjo havis barelon da biero antaŭe, kaj mezŝipe Jerĉjo havis keston da tabako, kaj tute malantaŭe staris la kompatinda Jakĉjo, kaj direktis la ŝipon. Je la vespero, Jerĉjo kaj Joĉjo kutimis sonoretigi siajn trinkpotojn, kaj toasti la felixajn tagojn estontajn, kiam ili estos edzigitaj kun la reĝino. Sekve ili manfris al la mizera Jakĉjo la kapon, kaj ordonis al li observadi kaj teni la ŝipon survoje ; se ne, oni streĉos lin kiel la ĉefan halson. Kaj li devos prizorgi, ili diris ; alie, oni iĝos lin sopiri, esti pekinta kaj bolkuirita. Kaj pli bone estus, ili diris, ke li enmetu pli da sukero en la teon ; se ne, oni pecetigos lin kiel morulogaĵon. Kaj kiu li estas, ili demandis, ke li deziru vian-don kiel mangajojn, kiam troviĝas en la panujo tiom da kurkulisvarmitaj biskvitoj ?

Kaj la knaboj nuntempe degeneras, ili diris ; tiel impertinentas la aĉuloj, ke ili efektive deziras dormi ! Kaj, ja bona estas la situacio, ili diris, pro tio ke tiu knabo, kiun ili tiel bonkore traktis, kiun, iamaniere, ili savis de la paŭperejo, ke tiu nazplocu, nur pro tio, ke oni lin manfris. Se ili, kiam junuloj, kuraĝus ree diri eĉ unu vorton kiam oni ilin manfris, (ili memoris), oni estus ĉerpinta ilian sangon, kaj stariginta ilin en la vento por halti la sangfluon. Sed li atentu, ili diris, kaj konduitu sin bone, kaj faradu la laboron de kvin plenkreskuloj, kaj ne estus mirege (ili diris) se li iĝus viro antaŭ ol sia onklino.

Tiel, brilis la suno, kaj leviĝis la steloj, kaj la tuta maro ore respegulis ilin. Blua estis la maro, la vento blovis, kaj ĝi forblovis Joĉjon kaj Jerĉjon okcidenten tiel rapide, kiel kato englutegas sardenojn.

Kaj, je bela mateno, la vento ĉesis, kaj tra la maro dravis dolĉaodoro, simila al muskatoj en punĉo el rumo kaj lakto. Poste tagiĝis. Kaj, jen ! — eks-citema, grandega, mirindega, insulo, tute skarlata per koralo kaj rubenoj. La ondoŝaŭmo kiu batis sur la strandon, frakasigis kiel argentaĵ moneroj, kiel dolaroj kaj pezetoj kaj frankoj kaj kvarpenculoj.

(Daŭrligota).

POR VIA DISTRO

Humorajoj el Ĉeĥoslovakio

*

KONDUKTORO KAJ VOJAGANTO

K. : Vian bileton, mi petas !
V. : Mi ne havas.
K. : Kaj kien vi veturas ?
V. : Mi ne scias.
K. : Diable, kial vi eniris ?
V. : Ĉar vi tiom kriis : « Envaĝonigu ! »

SI KAJ LI

Si : Hodiaŭ vi tute malatentas min ;
Li : Vi ja ne pravas.
Si : Ho jes, vi eĉ ne demandas min pri mia farto.
Li : Nu, mia kara, kiel vi fartas hodiaŭ ?
Si : Eĉ ne demandu !

AMUZAJ PROBLEMOJ

(senditaj de Sro Jarlier)

La cigaredstumpoj. — Kolektanto de cigaredstumpoj trovis 10 stumpojn kaj volis ilin fumi. Sed necesis 3 stumpoj por fari unu cigaredon. Kiom da cigaredoj li povos fumi ?

La insekto. — Tri libroj, ĉiu 3 centimetrojn dika, lokigas sur breto, dorso antaŭe, unu kontraŭ la alia, la unua maldekstre, la dua en la mezo, la tria dekstre. Insekto, kiu manĝas paperon iras de la unua folio de la unua libro ĝis la lasta folio de la tria libro, horizontale. Kiom da centimetroj ĝi trairas ?

La heliko. — Heliko grimpas laŭlonge de fosto, 12 metrojn alta. Ĝi altiĝas 3 metrojn dum la tago sed descendas 2 metrojn dum la nokto. Kiam ĝi atingos la supron de la fosto ?

Divido de vino. — Persono havas 12-litran botellegon plena de vino. Li volas doni al sia amiko 6 litrojn da vino. Por mezuri ilin li disponas du botelojn : unu 7-litra kaj alia 5-litran. Kion li devas fari por meti 6 litrojn en la 7-litran botelon ?

(La solvoj aperos en la venonta numero).

Al la Esperanto-Domo

Dediĉita al JULIA ISBRUCKER kaj ANDREO ĈE
Kiu aranĝis kaj dediĉis al « Grezijono »

Teksto kaj musiko de
Catharina Roskes Dirksen

Muzikaranĝo de
Dina Appeldoorn

Gaje

Gre-zi-jo-no vo-Kas ĉi-un. Ti-e sta-rai
ni-a dom'. Ti-e lingvo Ĵa-men-ho-fa Li-gas
ho-men kun la hom! Gre-zi-jo-no,
en ar-ba-ro La Kastel' Por la a-noj de la lela
ver-da stel!

II

Kune studas, babiladas,
Guas, ridas, revas ni,
Tie ni diverslingvanoj
Sentas nin ĉe famill' !

III

Al la Esperanto-Domo !
Al la paca nia rond'
Por ke nia bela lingvo
Sonu tra la tuta mond'.

Le Gérant : H. MICARD


IMP. COCONNIER, SABLÉ

LA JUNAJ

DETEKTIVOJ

ILUSTRITA RESUMO DE LA NOVELO DE J.H. SULLIVAN

(3-a parto)




Post tuta semajno, dum la nokto, Lizbeto eniris la ĉambron de Andreo. « Vekiĝu, Andreo. Mi aŭdis ion. » De malsupre venis bruo de voĉoj kaj paŝoj kaj la grincio de la kelopordo.



« Estas strange », diris Lizbeto, « ke tiu viro venas longan distancon por preni tiun pakadon. Estas pli facile sendi ĝin per vagonaro ». « Tiu afero bezonas veran detektivon... kiel mi », diris Andreo.




Post tiu vizito Onklino timis : « Estas tro danĝere ». Estas nenia danĝero », respondis Onklo, « Ĉiokaze mi devas iri jaŭdon, ĉar mi ne havas tempon por averti ilin. »



Dum la matenmango, Andreo demandis Onklinon : « Kiu estas la viro, kiu ofte venas kaj forportas pakadon ? Kion Onklo vendas al li ? » — « Ĉi tute ne koncernas vin. Eliru kaj ludu ! » respondis Onklino.



Iun tagon policisto vizitis la onklon. La ĝemeloj aŭdis ke Onklo Konrado krias : « Serĉu tra la domo se vi volas ; mi certigas al vi, ke vi trovos nenion. » Post vana serĉado la policisto foriris.



« Mi ĝojas, ke li ne estas nia vera onklo, ĉar evidente li estas kontraŭbandisto » — « Ni devas resti vestitaj jaŭdon nokte kaj sekvi lin, kiam li eliros », diris Lizbeto.

(Represita kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de « La Junaj Detektivoj ». La libro (43-a paĝa novelo kun 9 ilustraĵoj de Brenda Goodwin) estas acetebla ĉe Esperantaj Libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonistoj, The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth, Herts. Anglujo, po 4 int. respondkuponoj.)

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364. BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (13 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncetajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
 Por ekieni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
 Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
 Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
 Por studi specialajn problemojn ;
 Por inter amikoj gaje libertempi ;
 Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo